

Novaĵoj de Mirejo Grosjean la 6-an de januaro 2019

Karaj geamikoj,

Mi esperas, ke vi fartas bone, ke vi bone glitis el 2018 al 2019 kaj ke vi komencas tiun novan jaron energiplenaj kaj riĉaj je pozitivaj projektoj. Bonvole ricevu miajn plej elkorajn bondezirojn, por ke ĉio konkeriĝu laŭ viaj esperoj.

Kutime gvidas min mia agendo en la listigado de la eventoj en la finiĝanta jaro. Sed en 2018, ekzakte la 22-an de septembro, en Neuchâtel, svisa urbo, kie mi loĝis en mia junaĝo, oni ŝtelis al mi mian sakon kun ene mia monujo, miaj bankokartoj, mia fotilo, miaj okulviroj, mia stirpermesilo... La ŝtelisto estas sviso... konsekvence estas riska afero resti hejme... 😊 Do mi provos skizi por vi mian jaron 2018 helpe de miaj fotoj.

En marto mi povis salti al Maroko por Esperanto-Kongreso en Marrakech, kaj mi longigis mian restadon por sola malkovri la urbon Fez. Belege. Fotoj vidiĝas sur mia blogo <https://mirejo3.blogspot.com/>

En aprilo mi estis por privata restado en Parizo kaj Budapeŝto. Tio okazas al mi ankaŭ.

En junio mi volis sperti la poliglota kunvenon ; mi partoprenis ĝin en Bratislavo, Slovakio. Lingva bano ene de 500 gejunuloj...

Julio : la kongresa monato. ILEI kunvenis en Madrido. Plena semajno kun intensa laboro, kun elektoj. Mi elektiĝis denove kiel prezidanto por tri jaroj. Laboro... laboro... sed mi ne rajtas plendi, ĉar mi konsentis preni tiun oficon.

Aŭguste mi saltis el Madrido al Lisbono por la Universala Kongreso de UEA. Mi limigis mian partoprenon tie por iom viziti la urbon kaj por ĝui la vivon sidante sur trinkejteraso aŭ en ŝipo. Post Lisbono, ĉar mi jam estis en Iberio, mi volis viziti Cordoba kaj Granada, du belegajn urbojn en Andaluzio. Malgrandaj hoteloj, trankvilaj promenadoj, gitaraj koncertoj, kulturaj malkovroj, giganta plezuro.

La unuan de oktobro mi flugis al Katmanduo por du semajnoj por viziti nepalajn amikojn. Poste mi flugis el Nepalo al Benino, tra Istanbul. En Kotonuo mi restadis trankvile ses semajnojn ; mi povis bone labori kaj inter aliaj okupoj plu verki mian libron « Lagoj kaj Larmoj », kiu ebligas al esperantistaj afrikanoj el la Grandlaga Regiono rakonti pri la milito tie kaj pri sia ĉiutaga vivo en tiaj cirkonstancoj. Mi ankaŭ renkontis esperantistojn el la kotonua regiono.

En decembro mi estis denove hejme en Les Brenets. Okazas, ke mi estas en Svislando, trankvile hejme... 😊 Sed laboro abundas : la vilaĝa parlamento, en kiu mi membras, komisionoj (ni laboras pri kunigo de mia vilaĝo kun la najbara urbo Le Locle), agadoj por subteni nian trajnlinion LE REGIONAL, koncertoj, prelegoj (mia listo enhavas pli ol 50 titolojn) iom da laboro en ĝardeno, vartado kaj riparo de la domo, kiu ne apartenas al mi, malfermita tablo unufoje monate por maljunuloj, kaj LA FAMILIO : miaj du filinoj, miaj du bofiloj, miaj tri nepoj alportas al mi ĝojegon en bela harmonia etoso. Miaj du filinoj informas min kaj edukas min en plej diversaj kampoj : valoraj konsilantoj kaj helpantoj.

Vi povas vidi fotojn sur mia blogo : <https://mirejo3.blogspot.com/> temas pri ĉapitroj.

Mia Facebook-paĝo ebligas al mi esprimi opiniojn kaj/aŭ emociojn laŭ la nubaj siluetoj dum tagiĝo en Kotonuo.... <https://www.facebook.com/profile.php?id=1024660125>

Mi elkore salutas vin kaj deziras al vi ĉion bonan por 2019 !!

Mirejo

Mi dankas al tiuj, kiuj sendis al mi novaĵojn kaj bondezirojn.